



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 231

Julio, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20



LETERO AL PARLAMENTANO DE NOVA DEMOKRATIO

Kara amiko:

Estas aparta plezuro korespondi kun parlamentano de lando kies demokratio estas tiel nova kiel skulptaĵo komencota. Vi estas bonŝanca havi la okazon doni formon al via demokratia registaro laŭ la plej bonaj ekzemploj de trans la mondo, kaj ankaŭ eviti la plej malbonajn erarojn.

Vi demandis al mi, en via letero, multajn aferojn pri la demokratia sistemo ĉi tie en Kanado.

Mi bedaŭras, ke mi ne povas tuj respondi al ĉiuj el viaj demandoj. Viaj demandoj estas tiom multaj, kaj tiel malfacilaj. Sufiĉe da tempo mi malhavas! Sed mi esperas, ke en nia korespondado dum la venontaj monatoj, ni povos preparoli la plimulton el viaj demandoj.

Mi komencu, substrekante ke mi tute ne volas diri ke mi havas ion ajn por instrui al vi pri la demokratio. La demokratio ne estas unu sistemo, kiu devas esti identa en diversaj landoj. Via lando havas sian propran historion kaj kulturon, do mi nepre ne volas diri al vi agu tiel, kiel oni agas en Kanado.

Samtempe, vere estas, ke Kanado havas 138-jaran historion kiel pli-malpli pacema, pli-malpli liberala, pli-malpli stabila demokratio. Do ŝajnas ke ekzistas ĉi tie kelkaj utilaj institucioj, el kiuj via lando povas elekti – kun laŭbezonaj adaptaĵoj – la plej dezirindajn.

Via korespondaĵo, fakte, cerbumigis min: kiuj estas la aspektoj la plej esencaj pri

nia demokratio? Post multe da pensado, mi kunmetis liston de sep esencaj trajtoj aŭ institucioj. Mi kredas, ke la bonstato de nia demokratio dependas de la ĉeesto de ĉiuj sep; kaj ne nur de la ĉeesto, sed ankaŭ de la ĝusta funkciado de ĉiu. La manko aŭ la malĝusta funkciado de nur unu detruas la integron de la tuta sistemo.

Jen la listo:

Unue: sendependa ofico por kontroli la balotadon. La popolo devas akcepti, ke la balotado estas libera, malferma kaj justa. Se ne, ĝi forĵetos la registaron.

Due: libera parolado. Estas esence, por sana demokratio, ke oni povas esprimi iujn ajn ideojn, en la parlamento aŭ aliloke. La demokratio estas bruega, certe, kaj kelkfoje neorda; kaj ĉi tiu bruoj kaj neordo timigas kelkajn homojn. Sed mi konvinkiĝas, ke el ĉi tiu varmega ideosupo venas la plej bonaj, la plej taŭgaj registaraj decidoj.

Trie: libera gazetaro. La ĵurnalistoj devas esti liberaj por esplori kaj eldoni ion ajn pri la registaro. Mirinde estas, kiel la „lumo” purigas registaron.

Kvare, kvine kaj sese: sendependa polico, sendependa persekutaro, kaj sendependa justico. La kialo estas sama: neniu ajn en demokratia lando, ekskludante nek la politikistojn nek la burokratojn, nek iliajn amikojn nek iliajn familiojn, nek la registaron mem, povas esti super la leĝo. Se estas korupteco, oni devas havi fidon ke la krimaj agadoj estos esploritaj, persekutitaj, kaj punitaj.

Sepe: Sendependa ofico por kontroli registarajn financojn. La plimulto de la registara laboro tuŝas la monon. Necesas havi unu precizan, publikan kompleton de registaraj kontoj.

Viaj politikistoj kiuj vere volas demokration, laboros ĉiutage por establi kaj defendi ĉi tiujn sep instituciojn. Aliflanke, vi povas rekoni la kontraŭ-demokratiulojn, laŭ iliaj streboj por malfortigi kaj elimini ĉi tiujn sep instituciojn.

En via sekvonta letero, eble vi povos priskribi al mi, kiel ĉi tiuj sep institucioj progresas en via nove demokratia lando.

Samideane salutas

Graham Steele

Redaktora noto: Ĉi tiu unua letero estas fikcio; la verkisto „Grejam” imagas, ke li korespondas kun, ekzemple, bosnia politikisto. Li havis du celojn: unue, plibonigi sian verkitan Esperanton (grava celo por *Inter Ni*); kaj due, esprimi resumon de la lecionoj, kiujn li lernis kaj ellaboris dum siaj vojaĝoj tra novaj demokratioj kiel Bosnio kaj Kosovo. Graham mem estas parlamentano en la Nov-Skotia Ĉambro de Deputitoj.

LETERO PRI DOLĈA KAROTO EN *INTER NI* n-ro 227

Iom malfrue mi reagis ĉar mi ricevas la bultenojn faske prokraste, sed mi devas reagi!

„Tiu ĉi estas bona artikolo”, mi diris al mi, eklegante la artikolon „Dolĉa Karoto” en *Inter Ni* 227, de 2005 marto. Kaj ĉe la fino de la artikolo mi samopinias. Sed kiam mi venis al la dua alineo, frapegis min sento de hororo! Kiel diable oni povus deziri „aldoni” dolĉaĵon al freŝa karoto??? La penso ankoraŭ sendas ekskuojn de hororo tra mia spino.

Jen kiel mi verkus tiun duan alineon, kiu komenciĝas per la demando, „Kiel prepari dolĉan karoton?": Kiel prepari dolĉan karoton? Kiam mi estis infano, mi jene faris, kaj mi ne povas imagi pli bonan manieron eĉ nun: Iru al la ĝardeno, kaj trovu la vicon de karotoj. Rigardu la vicon, kaj iru al loko kie la karotoj estas pli densaj ol en aliaj lokoj. Rigardu individuajn karotojn, kaj identigu la plej grandajn kaj sanaspektajn karotojn. Tiujn lasu por plu kreski. Sed la malgrandajn kaj mezgrandajn karotojn, kiuj tro proksimas al la grandaj, atente eltiru, lasante la pli grandajn kun sufiĉa spaco por plu kreski. Prenu taŭgan mezgrandan karoton per la verdaj foliecaj tigoj, kaj forviŝu per via bluginzio la terbuletojn alkroĉigantajn al la karoto. Per ungo fortranĉu la radikon pinte de la karoto. Ekmanĝu la karoton.

Ne ekzistas pli bongustaj karotoj ol tiaj!

Cetere, kiam oni satmanĝis la mezgrandajn karotojn, oni portu la ceterajn kun la malgrandaj en la domon, lavu ilin, kaj boligu ilin plenaj, kune kun la folioj kaj tigoj. Tiaj junaj karotfolioj, kuiritaj kun la junaj karotoj, ege bongustas! Ne tiom dolĉas kiam la freŝaj karotoj, sed tre bongustas.

Amike,

Joel Brozovsky

(Nun eksa Oficeja Direktoro de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA)
www.esperanto-usa.org)

RETLETERO DE ED HARLER

Levittown, Pensilvanio
la 4-an de junio, 2005

Malfruajn gratulojn, Bob, pro la dudeka datreveno de la komenco de *Inter Ni*. Sendube, ĝi estas unika inter ĉiuj el la eldonaĵoj ne nur en Esperantujo sed tutmonde. Ĝian unikecon subkuŝas kelkaj faktoj.

- Estas nur tri redaktoroj - Harry Lewis (la fondinto), vi mem, kaj Gene Keyes, kiu anstataŭis vin dum via studado - kiuj servis senpage. Tio ne estas kutima.

- La temoj estas universalaj kaj preskaŭ ĉiam interesaj. La enhavo ne estas nur pri Esperanto kaj Esperantistoj, sed pri ĉio, kion oni povas imagi. Kie alie oni povas lerni la diferencon inter la vergo de Asklepio kaj la flugilhava duserpenta vergo de Hermeso?

- Estas lojalaj subtenantoj. Kie ajn oni trovas kompostisto, kiel Steĉjo, kiu ankaŭ verkas multe? Aŭ Reni, kiu portas tri ĉapelojn? Kaj ni ne forgesu la manplenon da verkistoj, kiuj skribas interesaĵojn de tempo al tempo.

Kore,

Ed Harler

Redaktora noto: Multan dankon al Ed. Li bone komprenas, ke ju pli multaj kontribuantoj kunlaboras inter ni, des pli bone gustas nia „ideosupo”. Dankon ankaŭ al Ed pro la ŝercetoj.

MALDORMA EDZINO

- Mia edzino havas tre nebonan kutimon. Ŝi ne enlitiĝas ĝis la tria aŭ kvara matene.
- Nu, ĉu vere? Kial ŝi restas sendorma tiel longe?
- Ŝi atendas mian hejmeniron.

LABOREMULO

- Kiel longe vi laboras?
- Ekde tiam, kiam la estro minacis min pri maldungo.

AVINJO

Oni demandis al virino, ĉu ŝi baldaŭ vizitos sian filon kaj lian novan edzinon. „Ne,” ŝi respondis. „Mi atendas la naskiĝon de ilia infano.”

„Ho,” diras la amikino, „Vi ne elspezos la monon por vojaĝi al Kalifornio ĝis tiam?”

„Tio ne estas la kialo por tio, ke mi ne vizitas ilin nuntempe. Estas mia teorio, ke oni bonvenigas avinon pli ĝoje ol bopatrinon.”

